

Prezo: 6 €

www.satesperanto.org

Julio-Aŭgusto 2021 | n-ro 07-08 (1393-1394)



Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA



Sennacieca
Asocio
Tutmonda
1921–2021

Ni kune festu la centjariĝon de SAT inter la 23a kaj 26a de julio:

<https://sat.bialystok.pl/alighilo-2021/>

SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

Karaj legantoj:

La aperperiodo de tiu ĉi julia-aŭgusta numero de *Sennaciulo* kongruas kun la centjariĝo de SAT. La foto de la partoprenintoj en la fondkongreso en Prago, kiu utilis por krei la jubilean kongres-emblemon aperantan kovrilpaĝe, estis farita la 3an de aŭgusto 1921, tuj post la fino de la lasta laborkunsido. La cirkonstancoj ne ebligas al ni bombaste festi tiun eventon, sed tamen ni povas almenaŭ fieri, ke la asocio plu ekzistas kaj persiste fosas sian sulkon. Cetere, vi ĉiuj estas invitataj partopreni la retan kongreson, kiu finfine okazos inter la 23a kaj la 26a de julio. La PK, laŭ propono de la OKK, decidis grupigi la retan parton de la evento ĉirkaŭ semajnfino, konsiderante ke post jaro kaj duono da truditaj retaj kunvenoj, multaj riskas esti sataj pri tia kunvenformato. Tiel la postaj tagoj ebligas al la kuraĝuloj, kiuj tamen veturos ĝis Bjalistoko, iom ekskursi surloke. Kaj la ceteraj disponos kelkajn tagojn por laŭeble traduki, enretigi la diversajn prikongresajn raportojn kaj diskonigi ilin en sociaj retoj. Ni ĉiuj kunrespondekas pri la asocia bildo, kiun ni liveros al la mondo dum tiuj ĉi tagoj.

En tiu ĉi numero vi trovos la diversajn raportojn diskutendajn dum la kongresaj laborkunsidoj. Alia novaĵo estas ĝia surpaperigo sub la zorgo de nova presisto. Ja tiu, kiu zorgis pri *Sennaciulo* dum la lastaj 17 jaroj subite sciigis nin, ke li ne plu kapablas daŭrigi sian tiukampan aktivecon, kaj neglektis precizigi, ke li eĉ ne prizorgos la numeron 5-6, por kiu ni jam siatempe estis sendintaj la prian materialon... Ni esperas, ke vi pardonos al ni tiun prokraston, kiu ne estas kulpo de la respondeculoj de la revuo, sed trudita de eksteraj cirkonstancoj.

Agrablan legadon kaj partoprenon en la jubileado deziras al vi

La redaktoskipo

Enhavo *Enhavo*

Beletro

- 4 Pri Lanti
- 5 Mi stelojn jungis al revado
- 6 Hispana somero

Tra la mondo: Azio

- 8 Kontraŭ ŝtatrenverso!

Tra la mondo: Mezoriento

- 10 La kurdoj en la ŝaktabulo
- 10 Pliintensigis la atakoj en Roĵavo kaj miloj da loĝantoj forfuĝis

Tra la mondo: Eŭropo

- 12 Intervjuo al Gianna Gianulopulu
- 14 Intervjuo al Corsino Vela
- 15 Miaj prizonoj

Historio

- 16 La Pariza Komunumo
- 19 Unua dekreto de la Pariza Komunumo
- 19 Dekreto pri disigo Eklezio-Ŝtato
- 20 Libereca antiklerikalismo
- 21 Antaŭ kvardek jaroj

Opinioj - Reagoj

- 23 Observado kaj analizo de la doktoro Frédéric Badel, mensokuracisto specialiĝinta pri posttraŭmata streso

- 24 Eksperimento de Solomon Asch pri emo al konformiĝo
- 26 Dankon Zuck!
- 28 Geproletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu en revolucia internacio!
- 30 Letero al Svetlana

Tra Esperantio

- 31 Internacia Esperanto-Arkivo

El la SAT-administrejo

- 32 Agadraporto de la PK
- 35 Financa bilanco
- 37 Raporto de la ĜK-aro kaj KK

Nekrologoj

- 38 Carlo Bourlot (35425)
- 38 Bojana Alfirević (35884)
- 39 Albertus Navarro (1961-2021)

Pri Lanti

PECO EL LA LIBRO *MI STELOJN JUNGIS AL REVADO*

“ ... Mi rememorigu, ke la nure esperantlingva afero estas por ni sencela. Ni konsideras internacian lingvon kiel nepre bezonatan ilon, kiun ni devas meti je la servo de niaj politikaj celoj.”

E. Lanti, *Sennacieca Revuo*, n-ro 6, dec. 1921

Ho jes, Eugène havas kvardek... sed li tute ne estas kaduka! Ho jes, en lia barbo jam estas iom da grizo, sed kiom saĝa li estas! Kaj kiel li verkas, kiel li parolas! Efektive, kiam Francine aŭdas lin paroli al la amaso, aŭ diskuti, – egale kun samideanoj aŭ kun alipensemaj homoj, – ŝi sentas vertiĝon, entuziasman tajdon, ekflamon de la animsentoj, ĉu ne pli ardan kaj ekstazigan ol tiu, kiu venas dum amorado. Aĥ, kiel li parolas! Francine kaptas en la memoro lian diskuton kun iu nederlandano, veninta al la parizaj esperantistoj. Tiu... aĥ, Francine pene memorfiksas tiujn komplikajn alilandajn nomojn! Gugenkamp... Bugendoll... – ne gravas! Li, la nederlandano, palavradis pri la Bulonja deklaro de esperantismo. Jes, tion ŝi memoras: li diris, ke Esperanto ne celas forpuŝi la naciajn lingvojn... “Naiva opinio! – tuj rebatis Eugène. – Jes, naiva, ĉar, se ni, esperantistoj, sidos eterne en niaj tranĉeoj, por kio entute ni engaĝiĝis tiun batalon? Nepre la helplingvo, ne gravas ĉu Esperanto, ĉu Ido, ĉu io alia, – kvankam ni batalas por Esperanto, – do nepre la helplingvo forpuŝos la naciajn lingvojn al duarola funkciado,

kiam ĝi iĝos tutmonda proleta lingvo!” Ho, kiel aplaŭdis la homoj – ĉiuj, ĉiuj! – “Kial nur proleta? – oponis la gasto. – En Bulonjo oni interkonsentis, ke Esperanto estas neŭtrala homa lingvo, la lingvo por ĉiuj...” Sed Eugène – ho, Eugène ne longe serĉis la respondon. – “Pri kia neŭtralismo vi parolas, samideano? – li demandis ridetante, kaj tuj iĝis serioza-serioza! – Ni ne povas resti neŭtralaj dum daŭras la kapitalisma ekspluatado de la proletoj, kaj Esperanto estu nia helplingvo en la justa batalo por niaj rajtoj!” Denove aplaŭdedo, sed la oponanto tuj replikis jelpete. – “Kial do Esperanto estu nur via proleta helplingvo? Ja krom proletoj nia homa socio neeviteble havas ankaŭ intelektulojn – profesorojn, kuracistojn, artistojn, arkitektojn kaj ja ankaŭ burĝojn, jes! Kial vi emas diskriminacii kontraŭ tiuj kompatindaj personoj?” Eugène rebatis senprokraste, ĉar ja, verŝajne, li meditadis pri tio, kaj pretis en lia saĝa kapo la respondo. Kaŝante rideton en la barbego, li parolis tute trankvile, sed kun elokventa indigno. – “Ĉu vere kompatindaj? – diris li. – Mi opinias tiun vian diraĵon hipokrita, sinjoro. Kompatindaj estas la infanoj proletaj, kiuj devas tro frue sekvi laborvojon de siaj gepatroj por helpi la familiojn elvivi. Filo de kaldronisto iĝas kaldronisto, filino de kudristino ekkudras – tia estas la maljusteco de nia epoko. Kaj ĝuste tiuj infanoj devas lerni la simplan internacian lingvon, unuigontan ilin en la mondo por renversi



Lanti 1913

la maljustan mondordon. Sed viaj burĝoj, viaj intelektuloj – volu demandi vin honeste, ĉu vere ili bezonas nian lingvon? Kaj vi mem respondos al vi: ne, ili ne bezonas ĝin! Iliaj infanoj studas kelkajn fremdajn lingvojn en la plej luksaj lernejoj, kaj ili ja havas tempon kaj rimedojn por studi ĝis dudek sep, eble, ĝis tridek jaroj. Kaj poste – poste ili facile interkomunikiĝos kun reprezentantoj de sia ekspluatista klaso pere de tiuj lingvoj, do Esperanto por ili estas flanka afero. Eĉ ne flanko, sed absolute eksterbezona!” Jen do kiel arde kaj konvinke parolis Eugène... Ne havis plu ian argumenton la gasto, do silentiĝis ĉe aplaŭdoj kaj ridego de la salono.

Ho, Eugène estas vera viro! Francine sentas sin en lia ĉeesto tute sekura, protektita de ĉiuj kaj de ĉio. Eble, li eĉ havas iun armilon – almenaŭ pistolon. Nu... eĉ se ne havas, tutegale Francine scias, ke Eugène timas nenion en la

mondo. Policistojn, ĝendarmojn – tute ne, li kuraĝe mokas ilin dum la manifestacioj. Rabistojn – absolute ne – fakte ŝi konatiĝis kun li ĝuste en la vespero, kiam ŝin, revenantan hejmen post iu socialista kunveno, atakis du senhejmuloj. Estis Eugène, hazarde irinta malantaŭe kun amiko, estis li, kiu kriis, kuris al ŝi kaj bategis unu atakanton. Kaj ili tuj fuĝis, la fiuloj!

Li ne timas eĉ la morton mem! Ĉu ne estas li, kiu publikigis en la revuo “Esperanto” informon pri sia forpaso por ke la esperantistaro tuj kutimiĝu al nova nomo, prenita de li. Eble, tiu Privat, la redaktoro (inteligenta viro, cetere!) iom ofendiĝis poste, informiĝinte, ke estas nur mistifikaĵo, sed ne gravas...

Francine ŝatas unu plian trajton de Eugène. Malkiel tiu ŝikema stultulĉjo Maurice kun sia beleta barbeto, bluokula

muzeleto kaj kapablo plezurigi ŝin nur enlite, ve – eĉ tion ne ĉiuokaze, Eugène spertas karesi, ho jes! Ne gravas, ke li ne permesas al ŝi regi en la lito, estas eĉ pli taŭge, pli emociante, ke ĉion li faras mem por plezurigi ŝin... Francine honeste dirintus eĉ pli – malkiel Maurice, kiu emas esti ŝia posedanto unusola kaj por ĉiam, sklavigi ŝin per stulta formala geedziĝo, Eugène estas sincera adepto de liberaj rilatoj inter viro kaj virino, kaj, certe, li neniam ofendiĝus, se ŝi trovus plian amoranton. Ja tio tute ne gravas por ilia idea kuno, samideaneco – ŝi dirus pli ĝuste.

Kaj jen li, la riskemulo Eugène proponas al ŝi kunveturi Moskvon. Moskvon, Rusion! Ĉu Francine ne legas la ĵurnalojn? Ŝi legas! Kaj ĉiuj tiuj paperaĉoj preskaŭ ĉiutage raportas pri iuj eventoj en Rusio. “Bolŝevistoj”

deklaris la ruĝan teroron kontraŭ ĉiuj klasmalamikoj – kontraŭ burĝoj, nobeloj, grandbienuloj. Je dio, ĉu ŝi ne vidas per la okuloj? Tiuj rusoj pli kaj pli multas en Parizo kaj aspektas tre malfeliĉaj... La “bolŝevistoj” deklaris, ke ĉiuj fabrikoj, uzinoj, minejoj ktp apartenas al la popolo. Ŝi ne komprenas tion – devas esti iu gvidanto ĉie, kaj plej bone gvidus tiu, kiu estas posedanto de la gvidata objekto. Fi, ŝajne, Eugène mokridis pri tiu ŝia aserto... Li ridu, li estas saĝa. Ĉu Francine timas kunveturi? Certe, jes! Eĉ kun Eugène. Sed, kiam li diris: “Postmorgaŭ ni forveturas, samideanino. Mi akiris la biletojn”, ŝi tuj komencis paki siajn du valizojn. Sen diri eĉ unu vorton. Senproteste.

MIKAELO BRONŜTEJN

RECENZO

Mi stelojn jungis al revado

MIKAELO BRONŜTEJN

La libro pritraktas la tragikan historion de Esperanto precipe en unu lando: Sovetunio. Restas tasko por aŭtoroj verki pli detale pri siaj respektivaj landoj. La verko de Ulrich Lins *La danĝera lingvo* certe estas kompletiginda.

La aŭtoro Mikaelo Bronŝtejn verkis romanon el sia perspektivo - en ŝtato, kie li mem vivas kaj mem malfacile travivis - sed tiu ĉi konstato ne rilatas rekte al la enhavo de la romano. Ĝi temas pri monda historio, pri revolucio de la unua proletara kaj sukcesa renverso de malnova cara reĝimo. Ĝi estis modelo por sennombraj postaj revolucioj.

La aŭtoro pentras “la revadon” per la plej ŝokaj kaj abomenindaj koloroj.

Jam la titolbildo de la protagonisto Ernesto Drezen impresas terurige: ruĝkolora vizaĝo kun hipnota fiksrigardo makulita per haĉitaj strekoj. Jam la unua alineo enkondukas la spiriton de la tuta verko:

“La plej fama esenca ordono de “plej alta Forto (nome Dio)”: agu kun aliuloj tiel, kiel vi dezirus, ke aliuloj agu kun vi (el *Deklaracio pri Homaranismo*, febr. 1917).”

Pli realisme deklaris la *Manifesto de la Tutmonda Ligo de Socialistoj Esperantistoj* (Moskvo, 1917):

“La nuna granda milito ... enportis senduban tumulton, konfuzon kaj disecon en la pensoj de la internacia demokratio de ĉiuj landoj en la mondo. ... En la nuntempa vivo

